

Prezo: 7 €
www.satesperanto.org
Septembro-Oktobro 2019 | n-ro 09-10 (1371-1372)



Sennaciulo

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA



SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!



Libero min faras homo

Libero min faras homo,
Libero la lumon portas,
Libero liberon naskas,
Libero, sen vi mi mortas.
Aj, aj,
Libero, sen vi mi mortas.

MIGUEL FERNÁNDEZ

Libero min faras homo

Teksto:
Miguel Fernández

Melodio:
Liven Dek



Li - be - ro min fa - ras ho - mo, li - be - ro la lu - mon



por - tas, li - be - ro li - be - ron nas - kas, li - be - ro, sen vi mi



mor - tas. Aj, aj, li - be - ro sen vi mi mor - tas.

Karaj legantoj,

Jen la septembra-oktobra numero de Sennaciulo, iom pli ampleksa ol la pasinta. En ĝi vi trovos abundan materialon pri la barcelona kongreso, kompletige al la unuaj informoj donitaj en la julia-aŭgusta numero. Aldone al la ĝeneralaj raportoj, pluraj partoprenintoj pretigis specifajn resumojn pri unuopa programero, kiun ili partoprenis ĉu kiel aŭskultanto, ĉu kiel provizanto de diskut-materialo. Certe pri multaj pliaj programeroj eblos iom post iom raporti dum la jaro. Ne hezitu plu kontribui tiurilate ! Jam Guy Martin (guymartinguy@gmail.com) proponis sin por kunordigi tem-dosieron pri "Falego de nia tutmondkomerca civilizacio : ĉu povus baldaŭ okazi ?", lige kun sia dumkongresa prelego, por la marta-aprila numero. Kontribuoj estu senditaj antaŭ la fino de januaro 2020.

Vi ankaŭ povas jam pripensi vian kontribuon al la venontjara kongreso en Bjalistoko, plenigante la kunsenditan aliĝilon.

El administra vidpunkto, la kongreso akceptis novan kotiztabelon por la jaro 2020, troveblan en la paĝo 37. Jen do momento por ĝisdatigi vian jaran ĝiron... aŭ starigi ĝin se vi ne jam kutimiĝis al tiu pagmaniero, kiu faciligas la laboron de niaj perantoj kaj kasisto.

Fine notu, ke tuj post la reta dissendo de tiu ĉi numero, la redaktoskipo okupiĝos pri la lasta numero de la jaro 2019 kaj samokaze pri Sennacieca Revuo. Se vi jam preskaŭ finpretigis kontribuon, estas nun la lasta momento por sendi ĝin. Aliokaze ĝi estos bonvena por la numero de la jaro 2020.

Agrablan kaj verko-instigan legadon deziras al vi
La redaktoskipo

Frontpaĝa bildo:

Dumkongresa koncerto de Kaj Tiel Plu
Barcelona 10/08/2019.
Bildo realigita de Clara Baylina

Suba bildo sur la paĝo 23:

Surmura bildo fotita de Annie Griffon en
Barcelona (aŭgusto 2019)

RAPORTOJ PRI LA 92A SAT-KONGRESO

- 4 La "fajra rozo" eksterkutime logis
- 6 La 92-a SAT-Kongreso
- 8 Malfermo de la 92a SAT-kongreso en Barcelono: aparte fortaj emocioj
- 8 Resumo pri kongresaj laborkunsidoj
- 11 Rekuniĝo de malnovaj - tamen ne (tro) maljunaj – SATanoj*
- 12 Kial mi portas jupojn?
- 13 Pri la socialismo
- 14 Niaj sentoj pri ebleco de disfaligo de nia vivmaniero
- 16 La morto de Sanĉo
- 17 Don Kiĥoto kaj Sanĉo Panco: de Barcelono al Bordoza kaj reen

TRA LA MONDO: AZIO

- 19 Kio okazas en Honkongo?
- 20 Ne hastu sed pacience paŝon post paŝo por Paco
- 21 Taglaboristoj (1)
- 22 Problemo de 80-50

TRA LA MONDO: EŬROPO

- 24 En Baltio la maljuneco ne havas valoron
- 25 Intervjuo al Alessandro Stella
- 26 Nia starpunkto pri la nuna Labor-Partia gvidantaro

TRA LA MONDO: MEZORIENTO

- 27 Intervjuo al Alba Sotorra

TRA LA MONDO: AMERIKO

- 28 La Usona blokado al Kubo intensiĝas
- 28 3-a Kontraŭ-imperiisma solidarec-kunveno por demokrateco kaj kontraŭ nova liberismo

SOCIOSCIENCO

- 29 Intervjuo al Lars Wehring

SINDIKATISMO TUTMONDA

- 30 Turkio: reenpostenigu la municipajn dungitojn de Aliĝa
- 30 Kamboĝo: Solidareco kun la laboristoj de la templo Okcidenta Mebon

MEDIO

- 31 Vegana terorismo

BELETRO

- 2 Libero min faras homo
- 31 Poema kulturo en Usono
- 32 Usonen!
- 33 KUSPE

SAT-ANOJ AKTIVAS

- 34 Pluas la "elkatakombigo de la E-kulturo" ekster Esperantuojn en Hispanio
- 36 Raporto pri Komuna Somera Tendumo inter Koreaj kaj Japanaj SAT-anoj

NEKROLOGO

- 38 Hans RODEWIG

EL LA SAT-ADMINISTREJO

- 37 Tarifoj 2020
- 38 Novaj aliĝoj
- 39 Perantoj | Kotizoj | Praktikaj informoj

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn ni ne resendas. Kontribuojn sendu al:
sennaciulo.redaktejo@gmail.com*